# La NASKa Fasko

*Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UT-Dalaso*

**dimanĉon, la 1-an de julio, 2012 • numero ses**

## Hodiaŭaj eventoj



- ★ **8:45 atm – 12:15 ptm:** **Kursoj**
- ★ **7:30 – ??? ptm:** **Eventoj en la gufujo** Gregorio parolos al ni pri la fenomeno kaj historio de malicaj komputilaj programoj. Restu poste por gufuja babilado, teo kaj kleriĝo.

## Proverboj

*de* Don Vreeland

- Kiam homoj agas kiel ŝafoj, ili facile ŝafaĵiĝas.
- Ekzistas tempoj sekvi kaj tempoj esti sekvata.

## Eĉ pli da proverboj… teksas-stilaj

*de* Johana Hoenow

- Neniam maltrafu ŝancon por silenti.
- Se vi rajdas antaŭ la grego, rigardu malantaŭen por vidi ĉu ĝi ankoraŭ estas tie.
- Kiam oni trinkas el rivero, estas saĝe trinki el loko en la kontraŭfluejo de la grego.

***La NASKa Fasko***

**Redaktejo:** Ĉambro 4.418

<nask.esperanto@gmail.com>

*La NASKa Fasko* estas ĉiutaga informbulteno de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la "gufujo" en la 4-a etaĝo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 4.418, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

# La "Granda Ekapero"

*de Tejloro* Francis

Post nia diskuto pri la vetero, jen interesa okazo.

Je la 3-a de aprilo, 1974, okazis la "Granda Ekapero" de tornadoj en Usono. Dum 18 horoj, aperis 148 tornadoj en Ilinojso, Ohio, Indianio, Kentukio, Miĉigano, Virginio, Okcidenta Virginio, Tenesio, Norda Karolino, Misisipio, Alabamo, Georgio, kaj eĉ en Novjorkio kaj Ontario.

El ĉi tiuj tornadoj, ses atingis la grandecon F5. Kutime okazas nur 1 aŭ 2 F5-aj tornadoj ĉiujare. Fakte, inter 1953 kaj 2007 okazis nur 58 tiaj tornadoj.

La damaĝo de la "Granda Ekapero" kostis 3 500 000 000 dolarojn kaj 319 homoj mortis. La plej granda tornado estas videbla ĉe YouTube (serĉu: "Xenia Ohio Tornado") kaj vi povas vidi ke ĝi estis sufiĉe granda por havi multajn funeltubojn.

Tornadoj ne naskiĝas per la ĵetfluo, sed ĝi povas helpi krei la ŝtormojn kiuj produktas ilin. La ĵetfluon malkovris en 1926 japana meteologo Ŭasaburo Oiŝi, kiu verkis la unuan sciencan priskribon pri ĝi… en Esperanto!



Foto de la tornado en Xenia, Ohio fare de Fred Stewart.

# La koŝmaro komenciĝas

*de Johano* BENTLEY

*Jen la dua epizodo de la rakonto de Johano pri sia filino Savannah. Legu la unuan parton en n-ro kvin de la Fasko,* "Kio okazas ĉe Savannah?"

Kiel vi eble memoras, Savannah subite blindiĝis du tagojn antaŭ sia tria naskiĝtago. Cetere, ŝi ne povis paroli klare, ne povis promeni, kaj nun, ne povis eĉ rampi facile. Ĉiuj el ŝiaj agoj estis ja troigitaj.

Pro ŝiaj simptomoj, mi kaj mia edzino suspektis tion, kio eble okazis. Ekzistas viruso en katoj, kiu kaŭzas specifan cerbodamaĝon en katidoj, kaj la simptomoj estas precize samaj. La parto de la cerbo, kies tasko estas interalie kunordigi la muskolojn, estas la cerebelo. Ĝi glatigas agojn, kaj sen ĝi, ĉiu ago de ĉiu muskolo (inkluzive de la lango) estas tro kruda kaj tro forta. La viruso detruas la plimulton de la cerebelo en katidoj.

Kompreneble, Savannah ne povis havi tiun viruson, sed ŝi eble havis similan cerbdamaĝon. Sed ni ne povis diveni, kiel tia damaĝo povus okazi. La cerebelo estas ĉe la malantaŭo de la cerbo, kaj ŝia antaŭa sangelfluo estis preskaŭ ĉe la alia ekstremaĵo de la cerbo. Sed, kiam ŝi subite blindiĝis, ni ankaŭ subite konstatis, ke ŝi devas havi hidrocefalon.

Pardonu la sekvan medicinlecionon, sed ĝi estas grava por la cetero de la rakonto. La normala cerbo havas kvar fluidujojn; du antaŭe, unu meze, kaj unu malantaŭe. Tiuj ujoj necesas por subteni la formon kaj la firmecon de la cerbo. La fluido produktiĝas en la cerbo, kaj fluas de la antaŭo ĝis la malantaŭo de la cerbo, sekve en la spinon, kaj finfine fluas en la sangofluon. Se la fluo estas ŝtopita ĉe iu punkto, la fluopremo en la cerbo plialtiĝas, kaj cerbodamaĝo povas rezulti. Tiu difekto nomiĝas "hidrocefalo".

Etaj hundoj ofte havas hidrocefalon… ĉar kiam ili naskiĝas, ili ofte havas cerbajn sangelfluojn! La simptomoj dependas de kie la koagulaĵo ŝtopas la cerbofluon. Se la obstrukcio estas en la malantaŭa parto de la cerbo, la cerebelo estas damaĝita unue, kaj poste sekvas aliaj partoj de la cerbo. Se la cerbopremo troaltiĝus, la idoj povus havi multajn simptomojn, inkluzive de malbona kunordigo, troigaj agoj, kapdoloro, kaj SUBITA BLINDECO!

Nu, Savannah-n traktis pediatra neŭrologo dum du jaroj, sed necesis du bestkuracistoj por diagnozi ŝin!

Ni informis ŝian infankuracistinon (kiu ne estis ŝia neŭrologo), kaj la diagnozo konfirmiĝis per tomografaĵo ("CAT"-skano). La solvo por hidrocefalo estas, kompreneble, malpremi la cerbon. Por fari tion, oni enmetas etan tubon en unu el la fluidujoj de la cerbo. La cerbotubo konektiĝas al tre longa tubo kiu kondukas la cerbofluon el la cerbo, subhaŭte, al la ventrokavo, kie la fluo sorbiĝas en la sangofluon denove. La tubo restas tie por la tuta vivo de la homo, kaj sufiĉe da tubo estas metita en la ventran kavon por ke la fino restu tie, eĉ kiam la homo estas plenkreska.

Jen diagnozo, jen solvo! Ĉio estis en ordo, ĉu ne? Ne tute. Kiam ni demandis al infankuracistino, ĉu la cerbodamaĝo retroiros post la operacio, ŝi diris, kun kompato en la okuloj, "Ne tute".

Ŝi montris al ni la tomografaĵon, kaj ni povis klare vidi, ke Savannah tute ne havas cerebelon! Ĝi estis ne nur damaĝita, ĝi estis tute detruita pro la longa daŭro de la troalta premo! Mia edzino ekploris mallaŭte dum mi gapis kaj paliĝis. Mi sentis kapturniĝon, kaj subite mi devis sidiĝi.

"Ne estas tute senespera", la kuracistino diris. "Aliaj partoj de ŝia cerbo povas lerni kiel funkcii same kiel cerebelo. Do post tempo, eble ŝi povos promeni, paroli, ktp."

"EBLE povos" eĥis en mia menso.

Mia edzino, kiu tre rapide regis sin mem denove, demandis, "Kio pri la blindeco?"

La kuracistino diris, "La blindeco estas tre nova simptomo. La cerbodamaĝo povas retroiri al ĝia stato de ses monatoj antaŭ la operacio, do mi certas ke, post la operacio, ŝi povos vidi denove.

Mi balbultis, "Nur ses monatoj?", kaj mi sentis la glacian fingron de timo, kiu rampis laŭ mia spino. Mi kaj mia edzino rigardis unu la alian, kaj ni samtempe konstatis: laŭ la simptomoj, devas esti ke Savannah havas hidrocefalon almenaŭ kvinoble pli longe ol ses monatoj! Kia nekonata damaĝo okazis al ŝia cerbo dum tiu tempo? Mia edzino ekploris mallaŭte denove, kaj ni brakumis – sed ĉi tiun fojon, mi ne povis regi min mem, kaj ankaŭ mi ekploris.


Kial mi ne divenis la kialojn por la simptomoj de Savannah multe, multe pli frue? Tiom multe da tempo estis perdita! Ondoj da kulpo inundis min. Mia fido al la neŭrologo eble perdigis al Savannah normalan vivon. Tiu sufiĉas por koŝmaro, ĉu ne?

La kuracistino atendis dum ni konsolis unu la alian, kaj sekve daŭrigis: "Kompreneble, Savannah bezonas operacion. Bonŝance, nova neŭrologa kirurgo alvenis al Mobile antaŭ nur ses monatoj. Savannah povas operaciiĝi tuj."

Nun eniras la kanajlo de la rakonto, kaj la vera koŝmaro komenciĝas.

*(Legu la trian parton morgaŭ.)*

"Ho, mi vere ĝuas la pli-ol-cent-gradan temperaturon!" diris neniu, neniam.



(ideo/bildo senhonte ŝtelita de someecards.com)